# Fabrizio

Fabrizio Angelo Pennacchietti estas mia plej kara kaj plej longtempa amiko en la E-medio, kaj nia interrilatado dum la jardekoj tuŝis plurajn diversajn temojn. Dum certaj periodoj ni fizike distancis, sed neniam apartiĝis: ni havis ĉiam komunan temon, komunan kunvenon, komunan intereson, komunan institucian agadon.

Kiam mi estis deksepjara kaj estis vizitanta la IJKon en Villeneuve-les-Avignon en 1957 mi aŭdis pri talenta junulo studanta en Romo, kaj supozis, ke li venos eĉ nur preterpase al la IJK, sed renkontiĝo ne okazis. La postan jaron mi ekkonis en la IJK Barbro, la svedinon kiu poste iĝos lia edzino. Kvankam tiam Romo estis mia kutima revenloko post kongresoj aŭ studado en Pisa, mi neniam renkontis Fabrizion, kiu jam estis migrinta al islamaj landoj por perfektiĝaj postuniversitataj studoj. Mi ne memoras pri kunaj estraranecoj, kvankam tiuj estis la jaroj de mia institucia aktivado en TEJO kaj en la Itala E-ista Junularo.

Male, tute precizan memoron mi havas pri pli maturaj tempoj, kiam ni kune partoprenis en studotagoj ĉe la Internacia Esplorcento pri la mediaj strukturoj "Pio Manzù" okazintaj en septembro 1975[1]. Ni estis jam stabilaj universitataj profesoroj, li jam sekure lanĉita al pli altnivela katedro pri semidologio, mi pli modeste klopodanta travestii al aplikata matematiko miajn studojn pri lingvistiko. Ni havis tiam okazon gasti en la sama hotelo en Rimini, manĝi kune kaj longe diskuti kun aliaj partoprenantoj en tiuj tagoj, kiuj ja ne estis principe esperanto-temaj, sed kunigis plurajn fakulojn pri la internacia komunikado, inter kiuj kibernetikisto Silvio Ceccato (moderiganto), Alessandro Bausani, Alberto Mioni, Tazio Carlevaro, Renato Corsetti, Nino Vessella. La tiama parolado de Fabrizio pri la lingvaj minoritatoj en Irako estis elstare klera kaj klara; kiam ni private interparolis pri eblo altiĝi al orda profesoro li modeste, sed realisme, diris "Danĝeraj ni estas kvar", kaj fakte je la tuj posta ŝanco li iĝis eksterorda profesoro (poste orda) antaŭe en Venecio kaj poste en sia kutima loĝurbo Torino.

Liaj rutinaj irrevenaj vojaĝoj Torino-Venecio donis al mi pluan okazon tre konkrete kunlabori. Estis la tempo de la longe treniĝinta redaktado de la Itala-Esperanta Vortaro, komencita de Stefano La Colla, kiun mi estis klopodanta kompletigi. Mi skribis ĉion mane sur unuopaj slipoj kaj miaj pluraj kunlaborantoj intervenis mane modife sur ilin. Ĉe la kelkminuta halto de la trajno en Padovo mi min

[1] Giornate Internazionali di studio organizzate dal Centro Internazionale ricerche sulle strutture ambientali "Pio Manzù", Rimini, Teatro Novelli, 21-23 settembre 1975; publikigita en *Strutture ambientali* (Rimini) 30 (1976): 5-93.

trovigis sur la ĝusta trotuaro, Fabrizio alfenestriĝis, alprenis de mi reviziotan paketon da slipoj aŭ redonis al mi reviziitan; tio okazis plur-plurfoje. Cetere en Torino li ne nur reviziis miajn slipojn, sed ankaŭ peris la kroman reviziadon de Clelia Conterno. Dum lia instruado en Torino en la komisiita kurso pri Interlingvistiko kaj Esperantologio, kiu daŭris pli ol dek jarojn, mi rolis unu fojon kiel spertulo pri la fako kaj ekzamenis liajn (cetere tre bone preparitajn) studentojn.

Tre intense ni kunlaboris ankaŭ ĉe la Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino. Mi estis sekvinta tepide ĝian fondiĝon la 28an de decembro 1983, ĝis iu lia telefonado kelke da monatoj poste stimulis min al partopreno en jam startinta iniciato kiu ŝajnis, kaj dum preskaŭ kvardeko da jaroj ja estis, ekstreme grava. Li estis prezidanto de la Eŭropa Klubo kaj estis peranto inter la iniciatinto Helmar Frank kaj la ministrino de San Marino Fausta Morganti; ja en San Marino aktivis la instruistino kaj virindefendanto Marina Michelotti, kiu pretigis tre favoran terenon por esperantlingva aktivado: fakte nur el San Marino, el la kvar alproponitaj malgrandaj ŝtatoj, venis favora respondo por iniciato de universitatnivela Akademio.

La Sanmarinaj Universitatoj Semajnoj establiĝis en la Respubliko San Marino kiel oficiala ŝtata institucio, disvolviĝis kursoj, okazis kursfinaj ekzamenoj kaj mi kaj Fabrizio dum jaroj ilin plenumis plejofte samkomisione. Tio kondukis nin ankaŭ ekster San Marinon, ĉar la programoj de AIS etendiĝis ankaŭ al Sibiu (Rumanio), Bydgoszcz (Pollando), Nitra kaj Komárno (Slovakio) kaj al la Universalaj Kongresoj. Tiaj programoj de AIS disvolviĝis prefere en lokoj kie loĝis enlandaj minoritatoj, kia la germana en Sibiu, aŭ la hungara en Komárno. Ni ĉiam estis kune kaj prelegis en tiuj kursoj. Vojaĝoj ne estis ĉiam tute glataj: mi memoras kiam ni devis trairi piede hungaran-slovakan landlimon; ni haltis en Hungario ĉe la landlima stacio Györ kaj, atende de la trajno kiu devis konduki nin al Aŭstrio, klopodis deĉifri menuon en restoracieto; tagofine mi memoras kunan vesperon en belega Viena parko.

Plaĉa estis la ĉiujara "asembleo" de AIS, devige okazanta en San Marino por ke la stato de sanmarina institucio estu plu kaj plu konservata. Pro la bedaŭrinde definitiviĝinta senintereso de la sanmarina iama subtena grupo, la asembleo konsistis en la lastaj jaroj el nur tri personoj, Fabrizio, mi kaj la sanmarina sekretario Riccardo Venturini. Fabrizio venis trajne el Torino kaj tranoktis en Rimini; mi, akompanate de mia edzino, venis matene aŭtomobile el Padova, lin kunprenis el la hotelo kaj aŭtis dum la ĉ. duonhora iro ĝis la lokalo de la asembleo, jen en la Urbo San Marino (landcentra) jen en Serravalle, unu el la administraj distriktoj de la respubliko, nomataj "kasteloj". La kuna vojaĝado stimulis longajn kaj informoplenajn rakontojn de Fabrizio pri siaj pluraj vojaĝoj, studoj, spertoj en landoj kiaj Turkio, Malto kaj Irako: li konis altrangulojn, vezirojn, princojn. Por ni, kiuj neniam estis vizitintaj tiujn landojn, liaj raportoj pri kutimoj, strukturoj, sociaj klasoj estis ekstreme fascinaj. La asembleon kutime sekvis amika kunmanĝo ĉe restoracio laŭ la subenstrato de San Marino al la

marbordo, aŭ iam ankaŭ ĉe prof. Fausta Morganti, eksa ministro de San Marino, kiu oficialigis la aktivadon de AIS.

Post la estingiĝo de AIS San Marino, kiu plu aktivas sub la simpla nomo AIS, nia kunlaboro daŭras konstante en la Itala Esperanto-Instituto, kies prezidanto Fabrizio estas ekde pluraj jaroj (kaj mi estas ĉiam invitata kiel membro de la arbitracia kolegio); ni intervidiĝas periode dum la italaj E-kongresoj aŭ per zomo kaj mi lin sekvas sur la paĝoj de Literatura Foiro, kies konstanta kunlaboranto li estas; interesa lia teorio pri la evoluo de la lingvoj laŭ la globzonoj, depende de la horoj dum kiuj ili estas lumigataj de la suno.

Pluan sanon kaj laboron!

*Carlo Minnaja*
Universitato de Padovo
carlo.minnaja@gmail.com



*El maldekstre:* Tazio Carlevaro, Fabrizio A. Pennacchietti, Alessandro Bausani kaj Carlo Minnaja (25 septembro 1975; Grand Hotel, Rimini)